

Ioan Slavici

LA MUELILO DE LA FORTUNO



FEL



La muelilo de la fortuna

La muelilo de la fortuno

Ioan Slavici

La muelilo de la fortuno

Eldono de Flandra
Esperanto-Ligo

Tiu ĉi bitlibro estas proveldono kun nur tri ĉapitroj. Ĝi rajtas esti kopi-
ata kaj distribuata senkoste, kondiĉe ke la enhavo ne est adaptita. La
kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, [butiko@fel.es-
peranto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be).

Oni estu kontenta pri sia malriĉeco, ĉar se pri tio estas la parolo, ne la riĉeco, sed la trankvileco de via dometo feliĉigas vin. Sed vi agu, kiel la koro diras al vi, kaj Dio helpu kaj kovru vin per la flugiloj de Sia boneco. Mi nun estas maljuna, kaj, ĉar mi havis kaj havas tiel multajn ĝojojn en la vivo, mi ne komprenas la malkontentojn de la junuloj, kaj mi timas, ke serĉante nun en maljuneco novan bonŝancon, mi perdus tion, kion mi havis ĝis la hodiaŭa tago, kaj ke mi trafus ĉe la fino de mia vivo la amarecon, kiun mi ne konas, nur ĝin timas. Vi scias, vi agas: min vi ne obeu. Por mi estas malfacile forlasi la dometon, en kiu mi pasigis mian vivon kaj kreskis miajn infanojn, kaj kaptas min speco da timo, kiam mi pensas resti sola en ĝi: pro tio, eble ĝuste pro tio, Ana ŝajnas al mi tro juna, tro serioza, iom tro milda je naturo, kaj mi emas ridi, kiam mi imagas ŝin kiel drinkejmastrinon.

- Do mallarĝe, respondis Ghi?ă⁽¹⁾, ni restu ĉi tie, mi flikadu plu la botojn de la homoj, kiuj portas la tutan semajnon rimenŝuojn aŭ iras nudpiede, kaj se dimanĉe estas koto, ili portas la rimenŝuojn enmane ĝis la preĝejo, kaj ni sidiĝu en la verando de nia domo je suno, mi rigardu al Ana, Ana al mi, ni ambaŭ al la infanoj, kaj vi al nia triopo. Jen la trankvileco de nia dometo.

- Ne tiel mi pensas, diris la bopatrino trankvile. Mi nur diras, kion diras, mi diras nur miajn pensojn, kaj vi agu laŭ via penso, kaj vi scias tre bone, ke se vi iros al la muelilo, eĉ paroli oni ne povas pri tio, ke mi restu ĉi tie aŭ mi iru aliloken; se vi decidus kaj iros, ankaŭ mi iros kun vi, kaj mi iros kun tuta koro, kun tuta animo, kun tuta amo de la patrino, kiu akompanas sian infanon ekirintan en la mondon. Sed ne petu, ke mi decidu anstataŭ vi.

- Do, ni ne plu perdu la vorton sence: mi iros paroli kun la farmanto, kaj ekde la Sankta Georgo, la drinkejo Muelilo de la Fortuno estos la nia.

De Ineu la landvojo iras inter arbaroj kaj kampoj, forlasante dekstre kaj maldekstre la vilaĝojn troviĝantajn en anguloj de valoj. Dum unu horo kaj duono la vojo estas bona; poste sekvas deklivo, kiun vi surgrimpas, kaj kiam vi malsupreniras denove en valon, vi devas ripozi, trinkigi la ĉevalon aŭ la tirbovon, kaj lasi al ili tempon ripozeti, ĉar la vojo estis sufiĉe malfacila, kaj poste sekvas lokoj malbonaj.

Ĉi tie en la valo estas Muelilo de la Fortuno.

Ĉiu vojaĝanto veninta el iu ajn direkto, ĝojas je ĝia ekvido de sur la pinto de la kalva monteto, ĉar veninta el la malbonaj lokoj, la muelilo signifas, ke li eskapis bonŝance, kaj se li iras en direkton de tiuj lokoj, en la muelilo li povus trovi aŭ atendi aliajn vojaĝantojn, por ne daŭrigi la vojon sola.

Kaj, ĉar tie ekhaltas ĉiuj vojaĝantoj, iom post iom kreiĝis tretplatiĝo antaŭ la muelilo, kaj iel, nerimarkite, la muelilo ĉesis mueli, kaj fariĝis drinkejo kaj gastejo por ĉiuj lacaj vojaĝantoj, precipe por tiuj, kiujn la punkto trovis survoje. Poste la farmanto konstruis drinkejon en loko pli taŭga, je kelkcent paŝa distanco de rivereto, kaj la muelilo restis forlasita kun la ŝoveliloj rompiĝintaj kaj la tegmento truita de la tempo, kiu pasadis super ĝi.

Kvin krucoj staras antaŭ la muelilo, du ŝtonaj kaj aliaj tri skulptitaj el kverka ligno, ornamitaj per cirkelo kaj sanktaj ikonoj pentritaj; ĉiuj ĉi montras al la vojaĝanto, ke ĉi tiu loko estas benita, ja kie oni vidas similajn krucojn, tie iu havis ĝojon aŭ alia eskapis de danĝero.

Sed benita estis ĉi tiu loko precipe de kiam alvenis la nova drinkej-
mastro kun sia edzino juna kaj kun sia bopatrino maljuna, ĉar ili ne ak-
ceptis la vojaĝanton kiel fremdulon venintan el la mondo, sed kiel
amikon delonge atenditan en sia hejmo. Apenaŭ pasis kelkaj monatoj
post la Sankta Georgo, kaj la pli oftaj vojaĝantoj ne plu diris, ke ili
ekhaltos ĉe Muelilo de la Fortuno, sed ke ili ekhaltos ĉe Ghi?ă, kaj oni
sciis, kiu estas Ghi?ă kaj kie estas Ghi?ă, kaj tie, en la valo, inter la
deklivo kaj la lokoj malbonaj, ne plu estis Muelilo de la Fortuno, sed la
drinkejo de Ghi?ă.

Kaj por Ghi?ă la drinkejo estis de bonŝanco.

Dum kvar tagoj de la semajno, ekde mardo vespere ĝis sabato, ĉiam
ĝi estis plena, kaj ĉiuj ekhaltis ĉe la drinkejo de Ghi?ă, kaj ĉiuj aĉetis
ion, kaj ĉiuj pagis honeste.

Sabate je vesperiĝo, kiam la drinkejo senhomiĝis, Ghi?ă, povis iom ri-
pozi, kaj li eksidis kun Ana kaj kun la maljunulino por denombri la
monon, kaj tiam li rigardis al Ana, Ana rigardis al li, ambaŭ rigardis al
la du infanetoj, ĉar jam estis du, kaj la maljunulino rigardis al la
kvaropo kaj sentis sin rejuniĝinta, ĉar ŝi havis bofilon diligentan, filinon
bonŝancan, du nepetojn viglajn, kaj Dio benis ilin kun mongajno.

Dimanĉe matene Ghi?ă jungis la ĉevalon al durada ĉaro, kaj la
maljunulino iris al la preĝejo, ĉar la maljunulo, la bopatro de Ghi?ă,
estis peltisto kaj preĝeja kantisto, kaj tiel, iranta al la preĝejo, ŝi iris
kvazaŭ por lin revidi.

Kiam la maljunulino ekiris al la preĝejo, ĉio devis esti en ordo, ĉar alie
ŝiaj pensoj ne ĉeestus en la preĝejo. Jam sabate posttagmeze la
servisto devis purigi la ĉevalejon, la korton kaj la lokon antaŭ la
drinkejo, dume Ana kaj la maljunulino ordigis la drinkejon por la di-
manĉa tago. Dimanĉe, frumatene, la maljunulino vestigis la infanojn

en purajn subvestaĵojn, ŝi vestiĝis festotage, ankoraŭfoje rigardis ĉirkaŭen por vidi, ĉu vere ĉio estas en ordo, poste ŝi eksidis en la duradan ĉaron.

Ana kaj Ghi?ă kisis ŝian manon, ŝi kisis ankoraŭfoje la infanojn, poste diris:

- Bonan penson donu al ni Dio! Ŝi faris signon de la kruco kaj admonis por ekiri.

Sed ŝi ĉiam foriris kun peza koro, ĉar devis foriri sola kaj lasi ilin solaj en tiu soleca drinkejo.

Se vi ĵetis la rigardon ĉirkaŭen, dekstre kaj maldekstre vi vidis la landvojon serpentumantan al la pinto, kaj en la valo, laŭlonge de la rivereto, ĝis la senfina kamparo, krom kelkaj alnoj, kiuj staris grupe post la ŝtona ponto, vi vidis nur herbojn kaj dornojn. Ĉe la monteto la valo mallarĝiĝas pli kaj pli; sed tie la vidaĵoj estas multaj kaj diversaj: laŭlonge de la rivereto staras du vicoj da salikoj kaj genistoj daŭre densiĝantaj, ĝis kiam ili perdiĝas en arbareto, en la fundo de la valo. Sur la pinto de la monteto maldekstre, el la direkto de Ineu, videblas kelkloke la marĝeno de kverka arbaro, kaj sur la dekstra monteto staras ankoraŭ ne forigitaj restaĵoj de alia arbaro, trunkostumpoj, radikoj elstarantaj el la tero. Kaj ĝuste supre, sur la pinto, staras alta trunko duone bruligita, kun sekiĝintaj branĉoj, ripozejo por la korvoj malleviĝantaj grakante de sur la monteto al la kamparo. Fine la fundo de la valo mallumiĝas, kaj de malantaŭo de la malproksima arbaro, elstaras nur la ladkovrita turo de la preĝejo el Fundureni, sed kaŝita iomete de la ombro de montetoj kovritaj de arbaroj. Ili altas kaj grupiĝas ĝis la monto Bihor, sur kies pintoj neĝkovritaj rebatiĝas la sunradioj de la mateno.

Restinta sola kun Ana kaj kun la infanoj, Ghi?ă rigardas ĉirkaŭen, ĝuas la belecon de la loko, kaj lia koro ridas, kiam Ana, la saĝa kaj trankvila, subite perdas la seriozecon, kaj ĵetas sin en liajn brakojn dorlotita, ĉar Ana estis juna kaj bela, Ana estis delikata kaj svelta, Ana estis vigla kaj alfleksiĝema, sed li mem estis alta kaj forta, portis ŝin kiel malpezan plumon.

Nur kelkfoje, kiam dumnokte la vento ekskuis la forlasitan muelilon, la loko ŝajnis al Ghi?ă fremda kaj dezerta, kaj tiam li palpadis en mal-lumo, por scii, ĉu Ana, kiu dormis kiel banita infano apud li, ne estas malkovrita dum sonĝo, por kovri ŝin denove.



Laŭlonge de la rivereto, ĉie sur la herbokampo, paŝtas porko-gregoj, kaj kie estas multaj gregoj, devas esti ankaŭ multaj paŝtistoj. Sed ankaŭ la porkistoj estas homoj, kaj inter multaj, troviĝas homoj ĉiuspecaj, kaj ordinaraj kaj duarangaj kaj eĉ homoj imponaj.

Grego ne povas esti tro granda, kaj kie estas miloj kaj miloj da porkoj, devas esti centoj da gregoj, kaj ĉiu grego havas paŝtiston, kaj ĉiu paŝtisto estas helpata de du-tri knaboj - bojtaroj⁽²⁾, foje eĉ pli multaj, se la grego estas granda. Kreskas tutaj gentoj de porkogardistoj, homoj kiuj naskiĝis en la arbaro, ĉe la porko-grego, kies patroj, avoj kaj praaŭoj same paŝtistoj estis, homoj havantaj proprajn kutimojn kaj lingvon paŝtistan, kiun nur ili komprenas. Kaj ĉar ne estas komercado sen malutilo, kaj la paŝtistoj estas homoj malriĉaj, devas esti iu respondeca pro la malutilo okazinta en la grego. Tiu homo estas „sămădău”⁽³⁾, porkogardisto ankaŭ li, sed homo bonhava, kiu povas pagi la porkojn perditajn aŭ ŝtelitajn. Pro tio la porkomastro estas ne nur bonhava homo, sed ĉefe homo malmola kaj neŝancebla, kiu iras ĉiam rajdante de unu grego al alia, kiu konas ĉiun lokon, ĉiujn homojn bonajn, sed precipe la malbonajn. Timtremas lin la tuta kamparo, ĉar li trovas la orelojn de la perdita porko eĉ en la kuirpoto kun brasiko.

Kaj se oni diras, ke la lokoj apud Muelilo de la Fortuno estas malbonaj, vi devus nur demandi iun elinter la samadaoj, kaj li povus diri al vi, kial la lokoj ne estas bonaj, kaj kiu danĝerigas ilin. Sed la samadao estas, antaŭ ĉio, homo silentema, kaj se vi demandas pri tiaj aferoj, li respondas: „Mi ne scias, mi ne vidis, mi respondecas pri tiom da gregoj, mi ne povas penadi kun la homoj.” Li scias, kion li scias, sed tenas por si mem.

Venis kelkfoje al la drinkejo de Ghi?ă ankaŭ porkogardistoj, homoj alt-staturaj kaj muskolfortaj, en nigraj ĉemizoj, kun haroj brilantaj pro la abunda grasaĵo, longaj bukloj falintaj ĝis la nuda kolo. Homoj estis ankaŭ ili, eĉ honestaj homoj, kiuj manĝas, trinkas kaj pagas.

Iun lundan tagon venis tri individuoj en ĉaro malpezeta kun feraj aksoj, tiritaj de du ĉevaloj belaj, sed unu pli granda, kaj la alia malpli granda. En la ĉaro ne estis sidloko, nek fojno, sed unu el la porkogardistoj kun grasaj haroj starante pelis la ĉevalojn kaj la aliaj du sidis sur la verde farbitaj flankoj de la ĉaro, kvazaŭ ili estus venintaj nur el la proksimeco.

„Tiuj ne tro ŝajnas al mi esti bonaj homoj”, diris al si Ghi?ă, kiam li vidis ilin saltantaj el la ĉaro kaj rigardantaj ĉirkaŭen, kiel iuj, kiuj jam estis ĉi tie, sed nun ili ne trovas la iaman lokon, nek la iamajn homojn.

Ili demandis, ĉu jam estis Sămădău tie, sendis la serviston maljungi, trinkigi la ĉevalon, doni al ĝi avenon, poste ili eniris, drinkegis, ĉiu kiel tri, kaj foriris nur dirinte „bonan tagon!”

- Bone, sed ili ne pagis, diris la maljunulino nekomprene.

- Lasu, ĉar mi interkonsentis kun ili, respondis Ghi?ă, kaj foriris, por ke neniu vidu lian vizaĝon, kaj la edzino ne demandu: „Kio estas, Ghi?ă?”

Iom poste venis Sămădău, la fama Lică Sămădău, al Muelilo de la Fortuno.

Lică estis viro ĉirkaŭ trideksesjara, alta, sekstatura kaj kun kavaj vangoj, kun lipharoj longaj, kun okuloj malgrandaj kaj verdaj, kun brovoj densaj kaj kuntiritaj. Lică estis porkogardisto, sed el tiuj, kiuj portas ĉemizon fajnan kaj blankan, veŝton kun arĝentaj butonoj kaj vipon el karmezino, kun osta tenilo ornamita per skulptitaj floroj kaj oraj nitoj.

Li haltigis sian ĉevalon antaŭ la drinkejo, ĵetis rigardon al Ana, poste al la maljunulino sidantaj sur benko ĉe la granda tablo en la ombro de la verando, rigardis ĉirkaŭen, poste demandis, kie estas la drinkejmastro.

- Ni estas, respondis la maljunulino ekstarante.

- Mi scias, diris Lică, sed mi kredas, ke estas ankaŭ homoj ĉi tie. Mi serĉas la drinkejmastron; kun li mi volas paroli.

Lică diris tion tiamaniere, ke ili komprenu: li rapidas kaj ne plu volas perdi la tempon per parolo. La maljunulino foriris senprokraste por trovi Ghi?ă, kaj Ana restis rigardanta kun infana admiro la rajdanton, kiu staris kiel ŝtona kolono antaŭ ŝi.

Se Lică estintus alia homo, li ne restintus kun rigardo preterfluga, sed li ĝuintus la vidon de bela virino, kiu rigardis lin perdiĝinta kaj timigita pro la vireco de lia aspekto.

- Ĉu la hungaro mortis? demandis, kiam li ekvidis Ghi?ă.

- Jes!

- Kaj ĉu vi venis en lian lokon?

- Jes!

- Ĉu ekde la Sankta Georgo?

- Jes, respondis Ghi?ă, ĵetinte kaŝrigardon al la virinoj, ĉu ili ne maltrankviliĝis.

- Li estas Ghi?ă, mia bofilo, diris la maljunulino, kaj dank' al Dio, ĉio al ni iras glate de kiam ni estas ĉi tie.

Lică kaptis kun rideto sian lipharon inter lipojn.

- Ĉi tie, diris li, iras glate por ĉiuj homoj saĝaj. Vi nur estu en bonaj rilatoj kun ĉiuj homoj, diru „bonŝancon” al la alveninto kaj al la foriranto, kaj jam vi povas danki al Dio. Ĉu ne estis tie iuj homoj?

- Ja, respondis Ghi?ă eviteme, ni estas apud vojo, kaj iradas multaj homoj.

- Mi parolas pri tri homoj ...

- Tri, kvar, dek, diris Ghi?ă duonŝerce, oni senĉese iradas. Mi ne estas tie por kalkuli tiujn, kiuj venas kaj foriras, tial mi ne tro konas ilin. Post iom da tempo, oni al kutimiĝas, kaj ne atentis pri la vizaĝoj de la homoj. Kaj oni ne povas scii, eble iu malŝatus, se mi interesiĝus pri li. Oni neniam demandu drinkejmastron, ĉar li vidas kaj aŭdas tiel multon, ke li devas forgesi rapide kaj nenion rememori.

- Ĝuste, diris Lică. Mi nur demandis, por ke mi vidu, ĉu vi dirus al mi, ĉar ili estas miaj homoj. Ili iris por vidi la arbaron, kiun mi deziras fermi ekde la aŭtuno por la gregoj, kaj nun mi ne scias, ĉu ili estis ĉi tie antaŭ mia alveno, aŭ mi devas atendi ilin ĉi tie.

- Tio povas esti, respondis Ghi?ă decide, sed mi ne povas diri al vi, ĉu inter tiuj, kiuj estis ĉi tie, troviĝis ankaŭ ili.

- Kiel ne?! kriis la maljunulino malpacience. La tri porkogardistoj, kiuj drinkegis kaj ne pagis.

Ghi?ă sentis pikdoloron en la koro, kaj malgraŭ ke li ŝatis sian bopatraron, nun li ekdeziris fermi ŝian buŝon per fingro.

- La virinoj vidas pli bone, ja ili havas pli malmultan laboron, diris li memregante.

- Se ili ne pagis, diris Lică, kaptante denove sian lipharon inter lipojn, tion ili faris sciante, ke mi venos kaj pagos anstataŭ ili.

Tion dirinte, li elseliĝis, kaj faris signon al Ghi?ă eniri kun li por fari la kalkulon.

„La maljunulino estas tamen pli saĝa ol mi”, diris en si la drinkejmastro, kaj eniris bonhumora post li.

- La maljunulino povus teni fermita la buŝon, diris Lică, kiam li estis sola kun Ghi?ă. Ĉu vi konas min?

- Ne! respondis Ghi?ă, malvarmiĝinta en la tuta korpo.

- Sed vi konas mian nomon. Mi estas Lică Sămădău ... Multon oni diras pri mi, kaj el multo, multo estas vero kaj multo elpenŝaĵo. Vi vidas unu aferon: ke mi iras dum hela tago sur landvojo, kaj neniu haltigas min, ke mi iras al la urbo, kaj diskutas kun sinjoroj. Mi faris, kion mi faris sendube, sed mi faris tiel, ke oni povas kredi, kion volas, sed oni scias nenion. Pro tio mi donas kalkulon pri dudek tri porko-gregoj. Ĉu vi komprenis min?! Mi volas ĉiam scii, kiu iras ĉi tie, kiu kion parolas, kaj kiu kion faras, kaj mi volas, ke neniu krom mi tion sciu. Mi kredas, ke ni komprenis unu la alian?!

Ghi?ă havis multon por diri, sed Lică turnis sin sur la kalkanoj, kaj kiam la drinkejmastro rekonsciiĝis, la vojaĝanto jam ekspronis la ĉevalon.

- Tre brava homo, diris la maljunulino postsekvante lin kun la rigardo. Kiu estis tiu?

- Lică Sămădău! respondis Ghi?ă.

- Lică Sămădău?! ekkriis Ana. Kaj kiom da malbono oni diris pri li.

- Tia estas la mondo, diris Ghi?ă. KREDU nenion, ĝis kiam vi ne vidas propraokule.

Li mem ne sciis, ĉu li diris tiujn vortojn pro ĉagreno aŭ nur pro la deziro kaŝi antaŭ la edzino la pezajn pensojn, kiuj lin plenigis.

- Estas vere, aldonis Ana, li estas iom timiga je la vizaĝo.

- Tiel li ŝajnas al vi, diris Ghi?ă. Ankaŭ li havas siajn zorgojn.

IV

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

V

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

VI

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

VII

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

VIII

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

IX

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

X

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XI

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XII

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XIII

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XIV

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XV

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XVI

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

XVII

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la proveldono de la verko. La kompleta verko estas akirebla de www.retbutiko.net, butiko@fel.esperanto.be

NOTOJ de la tradukinto

Ioan Slavici (1848 – 1925) estas rumana verkisto naskiĝinta en Transilvanio, tiutempe parto de la Aŭstra–Hungara Monarkio. La aktivado de la novelo okazas ĉirkaŭ la jaro 1870.

Tiu ĉi verko estas tradukita laŭ la volumo: Ioan Slavici „Moara cu noroc”, Editura Ion Creangă, București, 1981. La unua eldono aperis en 1881.

1. Ghișă: prononcu „gic^ā”, Georgeto.
2. bojtaro: hungardevena, vicpaŝtisto.
3. sămădău: prononcu „s^am^ad^au”, samadao, porkomastro. La vorto *Sămădău* originas el la hungara vorto „számadó” (prononcu: samado).
4. Buză Ruptă: prononcu „buz^a rupt^a”, buŝo fendohava.
5. Săilă Boarul: prononcu „s^ail^a boarul”, Săilă la bovisto.
6. En ĉapitro XII Ghișă parolas pri la Lando, kien li eble forfuĝos. Temas pri Rumanio. Jam mi skribis supre, ke Transilvanio tiutempe ne estis parto de Rumanio. Tiu verko aperis la unuan fojon en 1881, nur post la unua mondmilito Transilvanio fariĝis parto de Rumanio.

Kolofono

Titolo: La muelilo de la fortuno

Aŭtoro: Ioan Slavici

Originala lingvo: rumana

Originala titolo: Moara cu noroc

Tradukis: Lenke Szász

Kovrilo: Ferriol Massip Bonet

ISBN de la papera eldono: 978-9077066-57-7

UDK: 82.3.892

NUR: 300

IBAN: 17-11-304-392

Leĝa depono de la papera eldono: D/2018/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antwerpen

www.retbutikio.net

© 2018 FEL, Antverpeno

